





№ 05  
1968

G.L. GINELLI

ITALIA

Organo  
Associazione  
Italiana  
Ferrovieri  
Esperantisti

ferrovista



21-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO EN AVIGNON 1969PROVIZORA PROGRAMO DE LA 21-a I.F.E.F.-KONGRESO EN AVIGNON (Francio)Vendredon la 16-an de majo: Gazetara Konferenco.Sabaton la 17-an: Kunsido de IFEF-Estraro kun la L.K.K.- Interkona vespero.Dimanĉon la 18-an: Diservo - Solena malfermo de la Kongreso - Distra posttagmezo - Internacia Balo.Lundon la 19-an: Komitataj Kunsidoj - Junulara Komisiono - Fakprelega Komisiono - Terminara Komisiono - Duontaga ekskurso per aùtobuso (Uzès kaj Pont du Gard) - Teatra kaj folkloro vesp.Mardon la 20-an: Komitataj Kunsidoj - Bankedo - Fakprelego kaj filmoj.Merkredon la 21-an: Tuttaga ekskurso per aùtobuso (Arles kaj Camargue).Ĵaùdon la 22-an: Plena Kunsido - Diversaj vizitoj - Junulara vespero.Vendredon la 23-an: Duontaga ekskurso per aùtobuso (Fontaine de Vaucluse kaj Orange) - Fermo de la Kongreso.

KONGRESA GLUMARKO: Estas verdkolora krom la centra bildo kiu estas nigra; la realaj dimensioj de la marko estas 45x35 mm.; la prezo estas 2 francaj frankoj po 20 pecoj (aldonu 0,25 fr.fr. por sendkosto). La eksterlandaj aĉetantoj bonvolu sin turni al: S-ro Hubert BERNIER, 109 bis Avenue de Clichy esc.3. F-75 PARIS-17 (Francio).

AVIGNON KONGRESURBO 1969

Jam en 1951, F.F.E.A. organizis en Parizo la 3-an IFEF-kongreson kiam nur 11 landoj estis membroj de nia federacio kaj kuraĝas denove plani duan organizadon. Precizaj studoj estis faritaj, kaj viglaj debatoj pri la taùgeco de ambaù urboj Royan kaj Avignon okazis antaù ol fine elekti tiun lastan por gastigi la kongresontojn de la 21-a IFEF-kongreso, kiu okazos de la 17-a ĝis la 23-a de majo 1969. Post la nigra maro kaj la oraj sabloj, kie dum la jubilea kongreso de nia federacio, ni ne dubas ke multaj gesamideanoj deziros vidi, aù revidi tiun belan sudan regionon de Francio, kie staras Avignon, kaj uzi tiun okazon por restadi ĉe la lazura marbordo, kies famo estas monde konata.

La historio de Avignon indikas ke la urbo, kiu ekzistis jam antaù 40 jarcentoj iĝis centro de civilizacio, arto kaj religio. En la praepoko (VII-a jarcento A.K.) ĝi estis negoĉejo gallogreka kaj ĝia sendependa monsinistemo atestas pri ĝia ekonomia forto en la jarcentoj antaù nia erao. Dum la "Rom-pacaj jarcentoj", la urbo koncentriĝis sur sian akropolon dum la nesekura periodo, kiu situigis inter la fino de la antikva mondo kaj la komenco de la mezepoko. Ĝis la XIV-a jarcento, Avignon ŝajnis dediĉita al modesta estonteco; sed subite en 1309, dank' al neatendita evento, Avignon iĝis la sidejo de la Papo, do la ĉefurbo de la kristanaro, kaj konis brilan jarcenton.

En Romo la Papo ne plu havis sian trankvilecon, kaj la restado en tiu urbo estis neeltenebla pro la senĉesaj opozicioj al la kvereloj inter la partioj. La Papo Klemento V, sub la instigo de la franca reĝo Filipo la Bela (Philippe le Bel) venis en apuda grafejo de Venaska. Lia posteulo Johano la XXII-a sin instalas en Avignon. La naù Papoj kiuj restadis en Avignon ĝis 1409 donis al la urbo gravan impulson artan, ekonomian kaj socian. Baldaù, ĝi estis kvazaù ŝirmejo por aventuristoj; ĝin minacis armitaj hordoj kaj pesto. Aliflanke, la italoj kaj la granda poeto Petrarko postulis ke la papa administracio revenu al Romo. Gregorio XI reiris al la itala ĉefurbo en 1377. Tiel komencis la granda skismo en okcidento pro la samtempaj regnoj de la Papo en Romo, kaj de la kontraùpapo en Avignon.

La klasika epoko pruvis tamen sian mirigan econ pri arto. Pri tio atestas la preĝejoj kaj multaj privataj hoteloj de la XVII kaj XVIII-aj jarcentoj. Ĝis la franca revolucio, Avignon estis sub la regno de la Papo. En la XVIII-a jarcento, du gravaj eventoj okazis: la pesto, kiu mortigis la tri kvaronojn de la loĝantaro en 1721, kaj la aliĝo de la urbo al Francio en 1791.

La nuntempa murego de Avignon estas kvin kilometrojn longa. Ĝi estis konstruata inter 1353 kaj 1370, kaj havis seppordojn al kiuj la XIX-a jarcento

aldonis kvin pasejojn. Ĝi ne estis unuaranga milita konstruaĵo, kaj ĝia celo estis nur starigi baraĵon antaŭ la papa palaco, gravega fortikaĵo konstruita sur firma roko. Tiu feoda kastelo, samtempe fortikaĵo kaj palaco, kies turoj altas je pli ol 50 metroj, havas aeron de 15.000 kvadratmetroj kaj estas unu el la plej vastaj en la mondo. Ĝi atestas pri eksterordinara arkitekturo civila, religia, kaj milita de la mezepoko. La palaco konsistas el du kunmetitaj konstruaĵoj: la palaco malnova, ago de Benedikto XII, konstruita inter 1334 kaj 1342, kaj la palaco nova, kiun starigis Klemento VI de 1342 ĝis 1352. Grave difektita dum la revolucio, la kastelo estis uzita kiel kazerno. En 1906 oni ĝin liberis kaj renovigis. Nun la vizitantoj povas admiri la koridorajn labirintojn, salonojn kaj kapelojn. La katedralo "Nia Sinjorino de la Doms" (Notre Dames des Doms), malnova romantika preĝejo renovigita dum la XV kaj XVII-aj jarcentoj, staras apud la granda palaco. Per najbara ŝtupareto oni atingas la grandan ĝardenon, planitan sur la roko de Doms, kiu superas la urbon. De tie estas belega panoramo sur la riverego Rodano, la ponto Sankta Benedikto, la tuta ĉirkaŭaĵo kaj precipe Villeneuve-les-Avignon kaj ĝia fortikaĵo Sankta Andreo.

Alia kuriozaĵo estas la ponto Sankta Benedikto famkonata franclingve je la nomo "Pont d'Avignon", titolo de populara kanzono kaj ronddanco. Benedikto, paŝtisto de la vivara regiono ĝin konstruis inter 1177 kaj 1185, sekve de ĉiela ordono, diras provenca tradicio. Tiu ponto superis la du brakojn de Rodano, ĝi estis 900 metrojn longa kaj atingis tiam Villeneuve-les-Avignon apud la turo de Filipo-la-Bela. El la dudekdu arkoj, kvar ankoraŭ restas, kaj sur unu staras la kapelo de Sankta Nikolao.

Estas ankoraŭ aliaj vidindaĵoj en Avignon: la malgranda palaco antaŭa episkopa kastelo, la hotelo de la monero muntempa muzika lernejo; la urbodomo kaj la turo Jacquemart (ĵakemar'); la muzeo Calvet (kalve) kiu entenas gravan artan kolekton kaj riĉan bibliotekon; la gema muzeo kun sia kolekto de malnovaj skulptaĵoj; la roma palaco, studa centro; diversaj belaj preĝejoj de la XIV kaj XV-aj jarcentoj, kaj malnovaj domoj.

La urbo mem havas multajn tre interesajn ruinojn kulturriĉajn. Ĝi ankaŭ estas elirpunkto al diversaj urboj famkonataj: Orange, Nimes, Arles, kaj al belegaj konstruaĵoj kiel Pont du Gard, kiujn la kongresanoj de la 21-a IPEF-kongreso povos viziti.

#### PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO =====

Korespondinte kun presejoj en pluraj landoj, Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), la eldononto de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (P.I.V.), elektis firmon, kies seriozeco kaj tekniko respondas al la postuloj minimumaj. Laŭ tiu oferto SAT povos vendi la vortaron je maksimume 19 usonaj dolaroj. La manuskripto kovros 1584 paĝojn en la formato 14X19,5 cm. (sama lertipo kiel en la grandformata Plena Vortaro de Esperanto), la ilustrado ampleksos 10 ĝis 12 kompletajn paĝojn. Antaŭ 37 jaroj SAT neniel hezitis por eldoni la 512-paĝan Plenan Vortaron, ĉar tiam la sukceso estis absolute certa. Ankaŭ certe la nuntempaj esperantistoj same avidus posedi la multoble pli riĉan P.I.V., sed la Esperanto-movado de 1968 estas alia ol en 1931.

SAT opinias do prudente afronti tiujn riskojn nur, kiam estos certe, ke almenaŭ 2000 esperantistoj estas pretaj mendi la P.I.V. kontraŭ efektiva pago de 19 usonaj dolaroj (proksimume 266 steloj).

Ni vokas al tiuj 2000 esperantistoj, ke sur simpla poŝtkarto, sendata al SAT, 67 Avenue Gambetta, F-75 PARIS-20, ili skribu jenan deklaron:

"Nomo kaj adreso. Responde al la alvoko de SAT mi firme kaj formale promesas aĉeti kaj pagi la Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto, kiam nova komunikado aperos en la Esperanta gazetararo. Dato kaj subskribo"

Ĝis plia alvoko oni prokrastu ĉian sendon de mono. Laŭ la rezultato registrita, SAT decidis pri la sorto de la manuskripto de PIV kaj eventuale respondos al ĉiuj promesintoj. Esperantistoj kaj fervojistoj, konsciuj pri la granda valoro de tiu unika verko, kiu levos la prestiĝon de Esperanto en la okuloj de la tuta klera mondo kaj ĝian utilecon en la manoj de ĉiu serioza uzanto.

### 53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN MADRIDO

Nia 53-a Tutmonda Kongreso okazis dum aŭgusto en la varma Hispanio. Varma ne pro la vetero sed pro la varma koro de niaj Hispanaj gesamideanoj. Ankaŭ la vetero, milda sed ne sufoka, estis al ni favora, dume en la aliaj partoj de Eŭropo, aŭ pluvis aŭ la suno bruligis ĉion.

Inter la eroj de la programo kaj multnombraj fakaj kunvenoj okazis tiu de la Fervojistoj: Prezidis D-ro Bacskai, komitatano de I.F.E.F. kaj de U.E.A., S-roj Saladrigas kaj Devis Pascual, la unua Estro de H.E.F.A. kaj la alia Hispana komitatano de I.F.E.F.

Alia bela tago okazis danke al R.E.N.F.E. kiu ebligis interesan altvaloran fakviziton al elektronika centro por la disdonado de la vojaĝbiletoj. Poste S-ro PEDROSA Estro de la Publikaj Rilatoj de RENFE, helpata de nia bona amiko Tomas Ortiz Garcia, regalis al ni, malavare, luksan lunĉon en la restoracio de la nova kaj moderna stacidomo Madrid-Chamartin.

Multaj malfacilaĵoj trafis gekongresanojn dum la fervoja vojaĝo precipe okaze de la vagonar-ŝanĝo en Barcelono, sed danke al la klopodoj de niaj kolegoj kiuj deĵoris por ni tage kaj nokte, multaj malfacilaĵoj estis forigitaj. Ni kore dankas tiujn sindonajn kolegojn kaj memoras kelkajn nomojn: Saladrigas, Virumbrales, Margalef, Gimenez kaj Oliveira el Barcelono, kaj Ortiz Garcia, Pérez Estévez, Berges Marias, Lopez, Quesada Chendre, M.Ortigosa kaj aliaj en Madrido kaj dum la ekskursoj.

Dum la kongreso oni disdonis abunde la belajn Esperantajn broŝurojn: "HISPANIO POR VI" eldonitan de Subsekretario de Turismo, kaj "VOJAĜI TRA HISPANIO ESTAS FACILE" eldonitan de RENFE (Nacia Reto de la Hispanaj Fervojoj).

### 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HELSINKI (Finnlando), 26-a de julio-2-a de aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Aliĝkotizoj: Ĝis la 31-a de decembro 1968 validas jenaj kotizoj:

1. Kongresano ne membro individua de U.E.A.	Ned.gld.	70
2. Kongresano membro individua de UEA kun Jarlibro (M.J.)	" "	60
3. Kongresano membro individua de UEA kun Jarlibro kaj "Esperanto" (M.A.)	" "	50
4. Edz(in)o de Kongresano en kat. 1	" "	30
5. Edz(in)o de Kongresano en kat. 2 aŭ 3	" "	25
6. Junulo ĝis 20-jara	" "	21
7. Universitata Studento ĝis 30-jara	" "	35
8. Blindulo	" "	28

Unua Oficiala Bulteno kaj Aliĝilo: Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Bulteno estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj kaj ĉe la kongresaj perantoj. La aliĝilo, ricevebla ĉe la samaj adresoj, troviĝos krome en la novembra "Esperanto".

### 57-a UNIVERSALA KONGRESO 1972 EN PORTLAND

La Estraro de U.E.A. ĵus decidis akcepti la tre allogan inviton organizi la 57-an U.K. en Portland, Oregon, ĉe Pacifika bordo de Usono. La tutmonda esperantistaro havas kvar jarojn por prepari sin, ankaŭ finance, al tiu nova ekstereŭropa kongreso.

### NOVA GRAMOFONDISKO

La Turista Sekcio "Esperanto" en Sofia, pere de fabriko "Balkanton" pretigis 33 r/m diskon kun ok kantoj. Sur la unua parto estas enskribitaj kvar estradaj kantoj prezentataj de elstaraj kantistoj, akompanataj de tri renomitaĵoj orkestroj kaj de la voĉa kvarteto "La Amikoj de la Kanto". Sur la dua flanko troviĝas tre popularaj turismaj kantoj, kantataj de la Koruso "Esperanto", kun akompano de akordiono. Prezo 1,25 dolaroj.

La disko estis dediĉita al la 20-a Jubilea Kongreso de I.F.E.F., al la 37-a Kongreso de B.E.A. kaj al 9-a Mondfestivalo de Junularo kaj Studentoj.

PIONIRO DE ESPERANTO: DOMENICO PASTORELLO

Kiu ne konas lin?... Pensulo, filozofa, specimenisto... sperta en la plej diversaj fakoj de la homa scio, li estas eĉ vera poeto pri enhavo kaj ritmo en korektaj metraj formoj modernaj. Li estas maldolĉa, logika, humerista, pikema kaj ĉiam polemika pri siaj tr konataj humanistaj sociaj kaj politikaj ideoj.

Pastorello estas sama fizike kaj mense en sia juna aĝo kiu preterpasis okdek jarojn! Estas senlace laborema: libervola verkisto kaj ĉarma interparolanto. Li estas plue tiel malprofitema ke li ne publikigas por vanteco nek gajno (Li diras "mi ne vendas miajn ideojn!") sed nur por eksponi ilia ĉar li juĝas siajn ideojn sincerajn, verajn, interesajn kaj taŭgajn por subteni nian estontan vivon en la proksima "dumil" epoko. Tial li sendas tute senpage ĉiajn mallongajn sed multnombrajn publikaĵojn al kiu ajn postulas ilin, skribante al "D-ro Ing. Domenico PASTORELLO - 13, FOS SUR MER (Bouches du Rhône = Francio).

Pastorello dum preskaŭ duonjarcento kulturas kaj disvastigas en diversaj manieroj la Esperantan lingvon (kvankam li konas ses aŭ sep fremdajn lingvojn) korespondante kun diversaj tutmondaj organoj de tiu ĉi nova kaj facila idiomo por ekbruligi la intereson kaj studon de Esperanto ĉar ĝi estas la unika maniero por fratigi la popolojn. Pro tio li publikigas en Italujo, sur la semajna ĵurnalo "Minosse" en Venezia, lecionojn kaj kronikojn de Esperanta lingvo kaj movado sub la titolo: "Noi in tutto il mondo". Petu specimenajn numerojn al la direkcio de "Minosse"- D.Polo 1085- 30100 VENEZIA (Italio). Ĉiu numero je 8/10 paĝoj, italajn lirojn 40.

Estas dume utile peti al la aŭtoro, ing. Pastorello mem, ankaŭ lian gramatikon "IO VI INSEGNO L'ESPERANTO": malmultaj paĝoj sed sufiĉaj por lerni Esperanton, ĉar ĝi estas prezentita per facila kaj amuza metodo nur en dek lecionoj. Estas vera plezuro havi ĝin kune kun ni, en poŝto, kiel "vademekum" tre utila. Do rapidu! Ĉio senpage!

OSCAR CECCHI - FIRENZE

F O I R O J

LA MEDITERANEA FOIRO DE PALERMO UZOS ESPERANTON

La Mediteranea Foiro dankas ĉiujn Esperantistojn kiuj, el ĉiu ajn parto de la mondo, bonvolis esprimi per siaj tre ŝatataj leteroj, dankojn kaj gratulojn pro la iniciato favore al la peto farita de la Palermo-a Esperanto-Grupo "Trinakrja".

La instancoj de "L'Ente Fiera del Mediterraneo" konfirmas preni sur sia taskon helpi, kiel eble plej larĝe, al la postuloj kiujn la Palermaj esperantistoj faros por la venontaj foiraj manifestacioj kaj bondeziras la plej grandan sukceson al Esperanto en la tuta mondo.

En la kadro de la venonta "24-a FOIRO DE LA MEDITERANEO" kiu okazos en Palermo de la 24-a de majo ĝis la 8-a de junio 1969, la "Ente Fiera" jam decidis jenajn iniciatojn favore al Esperanto:

- 1- La Esperanto-flago flirtos apud tiuj de la partoprenontaj nacioj;
- 2- Bonveno kaj fina saluto estos adresitaj per laŭtparoliloj al la ekspoziciantoj ankaŭ en Esperanto;
- 3- Esperanto-interpretisto estos je dispono de la interesatoj dum la tuta periodo de la manifestacio;
- 4- Estos eldonitaj dokumentoj kaj faldprospektoj en Esperanto kun sciigoj pri la Foiro, kaj kun multaj fotoj;
- 5- Oni organizos Esperanto-Kongreson kun speciala rilato al la landoj situantaj ĉe la baseno de la Mediteraneo;
- 6- Granda budo estos je dispono de la loka Esperanto-Grupo por ekspozicio de libroj kaj alia materialo de propagando por Esperanto, dum la Foiro;
- 7- Oni eldonos grandan oficialan murafison de la Foiro ankaŭ en Esperanto;
- 8- Oni intencas uzi specialan poŝtnuligon kun teksto en Itala kaj Esperanto lingvoj, en la poŝtbudo de la Foiro.

En la atendo de la venontjara manifestacio, la Foiro jam metis je dispono de la lokaj esperantistoj senpage grandan ejon en kiu la grupo povos organizi Esperanto-kursojn kaj aliajn propagandajn manifestaciojn.

#### LA 10-a INTERNACIA FOIRO EN BRNO DAŪRE UZAS ESPERANTON

La Instancej de la Foiroj kaj Ekspozicioj de Brno (Informserve: Hlinky 104, BRNO - Ĉeĥoslovakio), okaze de la 10-a Internacia Foiro kiu efektiviĝis de la 8-a ĝis la 17-a de septembro 1968, eldonis belan Esperantan faldfolion, riĉe ilustritan. La faldfolio donas informojn pri la Internacia Foiro en Brno, "unu el la plej bone organizitaj foiroj" kaj pri aliaj ekspozicioj kiuj okazas en la ekspoziciejo de Brno dum la jaro.

#### FOIRO DE BARCELONO

La Foiro de Barcelono 1968-a denove eldonis oficialan afiŝon en esperanto. Ĝia eldonkvanto estis 5000 ekzempleroj, samnombro kiel por la aliaj sep lingvoj, per kiuj la Foiro faras sian propagandon.

Komprenemon al la Internacia Lingvo kaj pruvon de ankoraŭ pli bonaj rilatoj inter Hispana Esperanto-Instituto kaj Foiro de Barcelono pruvas la fakto, ke ĉijare la Foiro oferas al ĉiuj geesperantistoj ĝin vizitantoj, rabatojn en la hispanaj fervojoj, en 27 hoteloj de Barcelono, en 13 hoteloj en Madrido, senpagan eniron en ĉiuj muzeoj de Barcelono kaj, kompreneble, senpagan eniron en la Foiro.

Per profiti ĉiujn ĉi avantaĝojn, petu la "Legitimilan Karton" (Cédula de Asistencia), kiu estas havebla per simpla mendo al: Foiro de Barcelono, Ave. de Maria Cristina, Barcelona-4 (Hispanujo).

#### NI GRATULAS KAJ BONDEZIRAS

Naskiĝo Pala: Al gesinjoroj Nino kaj Marisa Pala (Via Satta 7 CAGLIARI, Italio) naskiĝis dua infano, knabineto Elena, kiu - same kiel la frate Mario - estos denaska esperantistino.

Naskiĝo Pompilio: La 30-an de junio al la simpatia internacia paro Hiroko kaj Glauco G. Pompilio (J.v. Campenplein 178, Rotterdam 14, Nederlando) naskiĝis la unua infano, filineto Menica. La Belognaj gesamideanoj kiuj memoras Pompilio kiel junan studenton en la unuaj jaroj de lia esperantistiĝo kaj kiel kasisto de nia 40-a Jubilea Univarsala Kongreso, nun funkciulon de U.E.A. kaj K.K.S., sendas al li al lia edzino kaj al Menica, varmegajn bondezirojn kaj gratulojn. Al la avino S-ino Linda, ĉiam en niaj vicej, ni prezentas apartajn gratulojn.

Geedziĝo Leterme-Thierry: La 20-an de julio geedziĝis en Parizo F-ino Marie Leterme kaj S-ro Jean Thierry. Ŝi estas aktivulino de la Esperantista Kulturdomo "Kastelo Grésillon" kaj li Prezidanto de la Franca Esperanto-Instituto. S-ro Thierry estas tre konata ankaŭ en nia medio, inter alie, kiel lerta kaj sindona verkisto de teatraĵoj kaj aktoro, dum niaj fervojistaj kunvenoj kaj kongresoj. Plue li reprezentas nia Esperanto-Movadon ĉe la sidejo de UNESCO en Parizo.

#### NI LEGIS

"Voci della Retaia", monata revue de Itala Ŝtata Fervojo, Direzione Generale F.S., Piazza Croce Rossa, Roma (Italio), artikolen kun foto pri nia 20-a Jubilea I.F.E.F.-Kongreso.

"Konduktörin Kieliavain", broŝuro eldonita de Finnlanda Ŝtataj Fervojoj "V.R" per la konduktoroj. Ĝi entenas seplingvajn (Sveda, Angla, Germana, Rusa, Franca, Esperanta kaj Finnlanda) demand- kaj respondilojn per la pasaĝeroj kaj konduktoroj de la vagonaroj.

"Ogamisama Diras...", Esperantlingva broŝureto pri Religia kaj Filozofia Instrue de la Japana Profetino de Tabuse. Sombendita, kopiita, tradukita kaj aperigita de memvela redakcia stabe. Eldonita de Tensho Kotai Jingu Kye, TABUSE, Yamaguchi-ken, Japan-Japanujo.

"Literatura Kajero 2", monata kultura kajero en Esperanto. Okpaĝa kajero de julio 1968-a. Redaktanto kaj Administranto: Henerik Kocher, Rua Baltasar Lisboa, 34 (ZC-11) RIO DE JANEIRO. GB. Brazilio. Abono per jaro: Eksterlando: 3 dolaroj.

## S.A.T.-KONGRESO EN UTRECHT

La 4-an de aŭgusto Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda "S.A.T.", malfermiĝis en N.V.-Domo en Utrecht (Nederlando). Re prezentis la F.E.R.N.-Estrare nia kara amiko van Leeuwen. Kiel anstataŭante de la Urbestro, alparolis la kongreson, s-ro P.L.Hassing, skabeno de la urbo Utrecht kaj membro de F.E.R.N. Poste parolis, inter aliaj, reprezentantoj de la Naturamikejoj, de la Nederlandaj junulargastejoj kaj en la nomo de I.T.F.; (Internacia Trafiklaborista Federacio) kaj de la Germana Sindikataro, la konata samideano Schalmey. Same kiel en niaj IFEF-Kongreso ĉiu parolis esperantlingve!

Granda sukceso por SAT estis ke NUD (Nieuw Utrecht Dagblad) eldonis gazeton kun unu tuta paĝo en Esperanto. El la "FERVOJISTO" organe de F.E.R.N.

### 5-a INTERNACIA KONGRESO DE LA EŬROPA INTERAMIKIĜO DE STACIESTROJ

Peschiera del Garda-Verona-Italio; 4-an, 5-an kaj 6-an de oktobro 1968-a  
Sekve de la konkludoj de la pasintjara kongreso en Brugge (Belgio) ni kontaktis kun s-ro Carlo Gugole, Staciestro de Verona kaj Prezidante de la Itala sekcio de la Eŭropa Federacio de Staciestroj. Nia Prezidante estis invitata partopreni al la kongreso en Peschiera, sed li ne povas iri tien kaj delegis la Sekretario de IFEA reprezenti lin en tiu kongreso.

### ĜENERALA KUNVENO DE FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "FFEA"

La venonta Ĝenerala Kunveno de F.F.E.A. okazos en Strasburgo la 26-an kaj 27-an de oktobro laŭ jena programo: Sabaton la 26-an de oktobro: de la 15-a ĝis la 17-a, vizito de la urbo, de la 17,30 ĝis la 19-a, laborkunsido, je la 19-a, vespermanĝo, de la 20,30 ĝis la 23-a, laborkunsido. Dimanĉon la 27-an de oktobro: je la 9-a, plena kunsido, je la 12-a, komuna tagmanĝo, je la 15-a, forveturo.

### LIBROJ DE DANA ESPERANTO-ELDONEJO HAVEBLAJ EN ITALIO

Nia kolego Gino CORSO el Verona povos liveri al vi librojn de la Dana Esperanto-Eldonejo. La formate de la libroj estas kiel la duono de tiu ĉi paĝo. La papero estas bonkvalita. La prezo inkluzivas sendkostojn. Pagu per poŝtkonto, poŝtmandato aŭ per ĉeko. Turnu vin al G.Corso, Via A. Valerini 5/a I-37100 VERONA (Italio). Poŝtkonto 28-5187. Telefono 29229.

### ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA-ESPERANTO - Casella Postale 320, I-00100 ROMA (Italio). La dissendoj okazas de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.). Redaktoro: Luigi MINNAJA. Ondlongoj: metroj 25,40; 30,90 kaj 41,24. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi subaj temoj: NOVEMBRO 1968-a: Dimanĉon la 3-an: tra la literaturo. 10-an: Novaĵoj el Italujo. 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 24-an: Leterkesto.

DECEMBRO 1968-a: Dimanĉon la 1-an: La fama itala aktorino Eleonora Duse, 8-an: Courmayer kaj la tunelo sub la Blanka Monto. 15-an: La itala poete G.Giusti. 22-an: La subakva sporto en Italujo. 29-an: Kristana mondo.

RADIO BUDAPEST-REDAKCIO DE LA ESPERANTO-DISSENDOJ - Radio Budapest komunikas ke la Esperanto-dissende okazas ĉiuvespere de la 20,30 ĝis 20,45 laŭ mezeŭropa tempo, dum la aŭtuna periodo -inter la unua de septembro ĝis la 2-a de novembro- per sekvaj ondlongoj: metroj: 16,8; 19,8; 25,2; 30,5; 41,6; 42,2; 75,1;kaj 240.

POLA RADIO-ESPERANTO-REDAKCIO, VARSOVIO, POLLANDO - Novaj Ondlongoj de la Esperanto-Elsendoj de la Pola Radio: metroj: 25,09; 25,39; 31,01; 31,35; 31,45; 41,99; kaj 42,11. La E-programo estas disaŭdigata ĉiutage de la 16,30 ĝis 17 h. laŭ mezeŭropa tempo. Ilustritan programinformilon pri la E-elsendoj oni povas ricevi senpage.

### ESPERANTO-LIBROJ HAVEBLA SENPAGE!

La Esperanto-Redakcio de la Pola Radio disponas pri kelkcento da ekzempleroj de la Esperantlingva libro "Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj", kiun oni sendas al ĉiuj unuopaj interesiĝantoj senpage. Por ricevi la eldonaĵon sufiĉas skribi poŝtkarten al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Pollando. La E-instruistoj povas utiligi la libron en la kursoj kiel legaĵon.